# EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado


**Enhavo**


- Eŭropa Kantfestivalo entuziasmigas
- Estrarano de UEA en Kamboĝo
- Sveda Kongreso en Stokholmo


.


EKO 2019-09 sendita el Budapeŝto la 3an de junio.

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.


*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol mil ricevantoj.*


Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA


## Esperanto subtenas popularan kulturon

La 7a Eŭropa Kantfestivalo okazis sukcese en la pola kultururbo Vroclavo fine de majo. la krona punkto estis la fina koncerto, kiu altiris publikon de ĉ. 200 personoj, kaj estis salutita de reprezentanto de la vroclava registaro. La aranĝo mem okazis en la impona halo de la vroclava philharmonia orkestro. Kvar ĵurianoj (inklvize de estrarano de UEA) havis pezetan taskon elekti gajnintojn el la trideko da konkursantoj, tiel ke dekkvino da grupoj povis vidigi kaj aŭdigi sin en la fina koncerto. El la infana/junulara kategorioj estis malpli da konkursantoj ol en antaŭaj jaroj, sekve la ĉefa konkurso okazis inter la ĥorusoj kaj solistoj de la Tria Aĝo. Tiuj estis aparte ravitaj de la koncertfina prezento de la konata kantisto jOmO kiu parolas inter multaj lingvoj la polan kaj povas interagi sprite kun pola publiko. Lia repertuaro gajnis entuziasmegan reagon de tiu publiko. Ili ĝoje manfrapis, ĥoruskriis, mangestis vigle kaj dancegadis sur la podio. Unike bona kaj rava etoso, eĉ kompare kun antaŭaj festivaloj.





Plurfoje la subteno de UEA estis menciita, la asocia simbolo videblis sur afiŝoj, ekranoj kaj en la impone presita kaj bindita programkajero, kiu entenas salutvortojn de IEIL kaj kiu donis la historion de la konkursoj kaj kiujn ricevis ĉiu gajninto de ajna premio, ĉu unua, dua, tria aŭ la *grand prix* kune kun iuj aliaj. Ĉiu premiito ricevis belajn atestilon kaj trofeon. Certe ili longe memoros siajn atingojn, kaj kune kun tio la nocion pri Esperanto. En la provoj oni rajtis prezenti unu nacilingvan kanton kaj unu en Esperanto. En la fina koncerto, ĉiu prezentis nur sian oferton de Esperanto.









En la antaŭa tago okazis unutaga simpozio en la Universitato de Vroclavo, kun kontribuintoj el Svedio, Germanio, Pollando, Hungario kaj Ukrainio. La instancoj estas tre malfermaj al pliaj kunlaboroj; en Universitato de La Tria Aĝo estas entuziasmo por kursoj de Esperanto, se nur troveblus instruistoj. La simpozio kaj la kantkonkurso, kaj tria aranĝo sude de Vroclavo estas organizitaj de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado.

## Atento al Kamboĝo – landa agado de UEA

Post la 9a Azia Kongreso en Danang, Vjetnamio, la estrarano de UEA respondeca pri la Azia agado vizitis Kamboĝon. S-ro LEE Jungkee raportas:

1. **Itinero**

Post la 9-a Azia-Oceania Kongreso de Esperanto, de la 28-a de aprilo ĝis la 2-a de majo, 2019 mi kaj korea esperantisto s-ro KIM Su-yong restis en Kamboĝo por renkonti tieajn esperantistojn.

2. **Renkontiĝo**

En la flughaveno s-ro CHHIM Sokha (prez. de Kamboĝa Esperanto-Asocio), f-ino Hor VuochLeang, kiu estas oficistino de la flughaveno, bonvenigis min. Vespere mi renkontis s-ron Sreng Teklong, kiu havas sperton kiel Esperanto-ĉiĉerono. Nome de Seula Esperanto-Kulturcentro mi donacis Esperanto-librojn al KEA.




3. **Esperanto-movado en Kamboĝo**

En la jaro 1993 Kamboĝa Esperanto-Asocio (KEA) fondiĝis iniciate de s-ro CHHM Sokha kaj onidire milo da civitanoj lernis Esperanton en tiu lingva instituto, kies estro estis s-ro CHHIM. Sed post lia forlaso de la instituto Esperanto-kurso ne daŭris.

4. **Nuna situacio**

Mi vidas, ke s-roj CHHM Sokha kaj Sreng Teklong estas ĉefmotoroj sed krom ili malmulto okazas. Tial mi forte konsilis, ke KEA daŭrigu Esperanto-kurson konstante por komencantoj. Se KEA ne naskos novajn esperantistojn, ĝia estonteco ne estas hela.

5. **Propono al KAOEM**

Rilate al lernolibro en la kmera lingvo, mi proponas al KAOEM, ke la elementa lernolibro de Stano Marcek estu tradukota fare de kamboĝa esperantisto kun subvencio de KAOEM.

# Svedoj kunvenis en Stokholmo

Sveda Esperanto-Federacio faris sian kongreson en Stokholmo de vendredo la 31-a de majo ĝis dimanĉo la 2-a de junio. Laŭ propono de Profesoro Christer Kiselman la organizantoj invitis la prezidantinon de ILEI Mireille Grosjean. Ŝi faris tri prelegojn. La proks. 40 partoprenantoj aŭdis 3 aliajn prelegojn, do entute 6. Okazis ankaŭ la ĝenerala kunveno de la Landa Asocio. Kantado kaj vizito de la poŝtomuzeo gajigis la kunestadon.

MG

Vortoj: 635

=====================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2018. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolinguloj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.